Prezo 7€

Sennaciulo estas la oficiala organo de
Sennacieca Asocio Tutmonda
http://www.satesperanto.org
Majo-Junio 2013, n-ro 05-06 (1295-1296)

# Sennaciulo

## Tem-dosiero:"Homa nutrado"



SAT-anoj kutimiĝu al eksternacia sent-, pens- kaj agadkapablo!

# Redaktangulo

**Karaj legantoj,**

Jen fine, denove kun granda malfruo, la Majo-junia numero de *Sennaciulo*. La redaktejaj problemoj, kiujn frontis *Sennaciulo* dum la lastaj monatoj, estis abunde pridiskutitaj dumkongrese, okaze de ĝeneralaj kunsidoj, de laborgrupoj, kaj de pli specifaj kunsidoj de la membroj de la redaktoskipo.

El la konstato, ke la redakta kunordigado estas tro peza por unu homo, kaj ankoraŭ ne plene horizontale dispartigebla inter ĉiuj skipanoj, eliris la propono, ke ĝin transprenu redaktoskipa kunordigotrio, konsistanta el k-doj Robin' Beto, Andreo Hoaro kaj Vinko Markovo, kiuj subskribis kun la PK interkonsenton, por ke *Sennaciulo* aperu dumonate kaj 36-paĝe, ekde de la nuna numero, ĝis la juli-aŭgusta de la jaro 2014, kiu devus foriri al presejo antaŭ la venontjara kongreso en Dinano.

La nuna numero konsistas plejparte el materialo jam finpretigita antaŭ la kongreso. Nur la diversaj agadraportoj, fakte jam aprobitaj, estis foje poluritaj surbaze de dumkongresaj demandoj kaj rimarkoj. Kun la juli-aŭgusta numero, ekspedota fine de Septembro, aperos la tre atendita SAT-adresaro, jam preskaŭ finenpaĝigita. La dosier-temo por la septembro-oktobra numero estos "Naciismo ktp". Tio estos okazo por pritrakti la politikan kuntekston de bedaŭrinda disputo, aludita en la raporto de la KK, kiu kostis al SAT la perdon de ses kamaradoj, kaj ankaŭ por pli vaste cerbumi pri la faŝismaj minacoj en la nuna mondo. Sekvos en Novembro-decembro dosiero pri "Virinaj kondiĉoj", kaj en Januaro-februaro alia dosiero pri "Politika situacio en latinameriko".

Per ĉi tiu nova funkcimaniero, ni celas kaj regulan aperon de la revuoj, kaj pli bonan partigon de la laboro inter la redaktoskipanoj. Sed tio ne solvos ĉiujn problemojn. Estis konstatite dum la kongreso, ke tre ofte mankas bilda materialo akompane al la tekstoj. Ankaŭ pri tio kontribuoj estas treege bonvenaj, aparte sub formo de personaj fotoj, desegnoj, aŭ eĉ simplaj sugestoj, kiujn povos eventuale realigi teĥnike pli kompetentaj skipanoj. Por ke *Sennaciulo* kaj *Sennacieca Revuo* denove estu la elstaraj revuoj de la esperantista proletaro tutmonda, ni bezonas vin, karaj legantoj. Ne hezitu kontribui!

Agrablan, kaj espereble verkostimulan legadon deziras al vi

*la RoKo (Redaktoskipa Kunordigotrio).*

**Planitaj temdosieroj**

La datoj respondas al limdatoj por ricevo de kontribuoj. Kontribuojn sendu al la redaktoskipo.

- ★ **Madrida Kongreso 2013** (Impresoj kaj raportoj) – 12-a de Septembro 2013
- ★ **Faŝismo kaj naciismo** Kunordiganto Vinko - 12-a de Oktobro 2013
- ★ **Virinaj vivkondiĉoj** Kunordiganto Tereza *Kapista* - 12-a de Novembro 2013
- ★ **Usona imperio** Kunordiganto *Kani* - 12-a de Januaro 2014
- ★ **Latinameriko** Kunordiganto *Brandon Sowers* - 12-a de Marto 2014
- ★ **Kongresa Temo: Lokaj civitanoj konstruas ontecon** - 12-a de Majo 2014
- ★ **Nekonata** - Bonvenas sugestoj - 12-a de Julio 2014

# Enhavo

**Redaktangulo** 2

**Tem-dosiero:"Homa nutrado"** 4

Enkonduko 4
Promeno tra l' pasinteco 5
Aŭstralio: ĉu taŭga nutrado? 9
Pri misnutrado kaj spirulino 10
Deklaracio de Kembriĝo pri Konscio 12
Cerbaj impulsoj - DoMo 13
En 2050 ni ĉiuj estos vegetaranoj! 14
Modernaj bestfabrikoj 15
Vegana Fiereco, festo de la fiereco vegetarana kaj vegetaĵana 16
Ni ne diigu la racion 18
La vegetarismo laŭ la vidpunkto de progresema homo 19
Pri la raporto de la Vegetara Sekcio 20

**Rubriko: Politiko** 21

La kubaj revoluciaj naciaj milicoj 21
Lejpcigo aŭ la subtila reformismo de la prezidento *Hollande* 22

**Rubriko: Ekonomiko** 24

Ekscesaj salajroj kaj kromsalajroj por manaĝeroj 24

**Rubriko: Intelekta memdefendo** 26

Solvoj al I.M. 26
Ludoj, enigmoj 27
Maldiligentaj SAT-anoj 27
Memkontraŭdira admono 27

**Rubriko: SAT-anoj aktivas** 28

"Ĉirkaŭ Karmena" dissemas muzikkapablon 28
Universitata SAT-grupo helpas senhejmulojn 29
Junaj esperantistoj en la kontraŭatomenergia movado 29
Lingvo kiel liberigo: Esperanto 29

**Rubriko: El la SAT-administrejo** 30

Agadraporto de la Plenum-Komitato por la periodo de Junio 2012 ĝis Majo 2013 30
Raporto de Ĝenerala Konsilantaro 2012-2013 34
Raporto de Konflikt-Komisiono 2012-2013 34
Prezento de la SAT-kontoj de jaro 2012 35
Raporto kontadkontrolo 2012 35
Ĝenerala Asembleo de la NEF (Nova Ekonomio Frateca) 36
Novaliĝoj 36
Nekrologo 37

**Rubriko: Poezia angulo** 38

Mia ekziliĝo en Alĝerio 38

**Praktikaj informoj**

Sennaciulo estas oficiala organo de S.A.T.

Asocia sidejo de SAT: 67 avenue Gambetta, FR-75020 Paris, Francio

Telefono: + 33.9.50.71.01.97
Retadreso: satesperanto@free.fr
Retejo: http://satesperanto.org

Poŝtkonto: SAT n°1234-22 K, Paris
IBAN: FR41 2004 1000 0101 2342 2K02 064
BIC: PSSTFRPPPAR
Konto de SAT ĉe UEA: sat-x

**Plenum-Komitato de SAT**

Prezidanto: Vinko Markovo
Sekretario: Tereza Sabatier
Kasistino: Franjo Lévêque
Membroj: Guy Cavalier, Arturo Prent, Brandon Sowers

**Sennaciulo**

Ĉefredaktantoj: Andreo Hoaro, Robin' Beto, Vinko Markovo
Enpaĝiganto: Ŝtonĉjo
Ceteraj redaktantoj: Nikolao Gudskov, Jomo Ipfelkofer, Djémil Kessous, Petro Levi, Vinko Markovo, Grazina Opulskiene, José Maria Salguero (Kani), Franciska Toubale

**Kontribuojn sendu elektronike al:** sennaciulo.redaktejo@gmail.com aŭ paper-poŝte al SAT-Amikaro: 132-134 boulevard Vincent Auriol, FR-75013 Paris, Francio

Ĉiujn demandojn pri financaj aferoj sendu al: franjo.leveque@gmail.com

Libromendojn sendu al: libroservo@sat-amikaro.org

Librajn eldonproponojn sendu al: pimskrabo@yahoo.fr

Pri la enhavo de la artikoloj respondecas la aŭtoroj mem. Ricevitajn manuskriptojn oni ne resendas.

Imprimé par: TROISA, 4 rue Théodule Ribot, FR-75017 Paris. Aperas dumonate - Bimestriel.

Le directeur de la publication: Guy Cavalier

Abonnement annuel/jara abono: France 57 €
Autres pays/aliaj landoj: peti la tarifon de nia peranto aŭ de la SAT-centro.

Dépot légal à la date de parution: N°CPPAP 0515 G 86567